

Raymond Schwartz mortis
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 512, 1973.08.01 & 04

Cl.- Parolas Claude kaj Andrée Gacond.

Esperantio ĵus perdis ege originalan verkiston, gajan spritulon kaj ĵongliston de la lingvo. Vi certe jam aŭdis la malĝojan novaĵon : « **Raymond Schwartz mortis !** »

A.- Hodiaŭ mia edzo citos al vi erojn el la du plej kortuŝaj nekrologioj, kiujn li havis la okazon legi en la gazetaro. Temas pri tiuj de du amikoj de Raymond Schwartz: **Roger Bernard** kaj **Reinhard Haupenthal**. Ili aperis en la organoj *Esperanto* de Universala Esperanto-Asocio kaj *Monata Cirkulero* de Kultura Centro Esperantista. Roger Bernard priskribas tiel la spinan kanceron, kiu suferigis kaj mortigis Raymond Schwartz :

Cl.- « *Dum unu tuta jaro li kruele suferis, kuŝanta sur lito, kaj preskaŭ ne moviĝante, sed sub la konstanta ama prizorgado de la edzino kaj filino. Malgraŭ ŝajnigo de espero, li de la komenco konjektis kaj sciis, kien li iras. Tre ofte mi vizitis lin, kaj mi nur povas admiri liajn ekster-ordinarajn kuraĝon kaj stoikecon antaŭ la fiksita sorto. Li nun por ĉiam ripozas en tiu Lorena grundo, kiun li tiel amis, kaj al kiu li dum la lastaj dek monatoj tiel sopiris. »*

A.- Reinhard Haupenthal priskribas tiel la karakteron de Raymond Schwartz :

Cl.- « *Se, ĉe la sojlo de lia tombo, mi retro-vagigas miajn pensojn, tiam du trajtoj de lia karaktero trudiĝas al mia memoro: lia profunda optimismo, kiu kredeble estis la fonto de lia humuro, kiu famigis lin en Esperantio kaj per kiu la supraĵa observanto tro facile etiketus lin. Ni, kiuj konis lin longe kaj intime, scias, ke lia humuro neniam estis masko, sed esprimo de lia granda homeco, de profundaj konvinkoj kaj religieco. Ni scias same, ke li estis samtempe serioza pensanto, kiu min forte impresis per maksimumo, kiun li ofte ripetis al mi kaj kiu ne restis sur mi sen efiko: « Nenio urĝas en tiu ĉi mondo! » Tiu lia maksimumo tamen ne estis preteksto por letargio aŭ flegmo. Raymond Schwartz, male, volis kaj kapablis engaĝiĝi. Kiam komence de la sesdekaj jaroj, en la Esperanto-movado unu detalo de ĝia gramatiko fariĝis disput-objekto, kiu ne plu limiĝis al kabinetaj diskutoj, sed tiris en sian vorticon eĉ plej simplajn adeptojn, ankaŭ li ne silentis. Dank'al sia talento rezonadi senkomplike, li alportis klarecon por ĉiuj, kiuj - same kiel li mem - estis malamikoj de abstraktaĵoj. »*

A.- Nun pri la talento de Raymond Schwartz, jen lasta diro de Reinhard Haupenthal:

Cl.- « *Liaj verkoj restos por la esperantistaro fonto de plezuro, ĝojo kaj admiro por homo, kiu malkovris latentajn eblojn de la lingvo. Li lasos en ĝi spuron, kiun neniu povos ignori kaj kiu garantios al li la simpatiecon de venontaj generacioj. »*

A.- Ĉiam pri la talento de Raymond Schwartz, jen citaĵoj el Roger Bernard :

Cl.- « *Kun Raymond Schwartz malaperas unu el la vere elstaraj tipoj de la Esperanto-movado. Plej humure sprita, sed neniam triviala, akrobato de la lingvo, el kiu li eltiris neatenditajn riĉojn, akra observanto de la homa naturo, eĉ en ĝiaj malfortaj punktoj, pacama bonvivulo [...] li havis dank'al tiuj kvalitoj karieron escepte fekundan kaj unikan, senprecedantan kaj fakte ĝis nun neimititan. [...] Ne estas troigo aserti, ke li stampis la Esperantan literaturon kaj parolvivecon per sia lingva genio. [...] »*

A.- Kaj nun Roger Bemard priskribas la homon :

Cl.- « *Mi volas, intima amiko lia jam de kvardek jaroj, ĉefe diri, kia homo li estis : nutrita de antikva saĝo kaj profunde klera, sed neniam tion elmontranta, plena de fajna ĝentileco kaj delikateco al ĉiuj, eĉ al la plej malaltrangaj, pacama, indiferenta al gloro, malŝatanta la vulgarecon, li vere estis homo homa, laŭ la konata formulo de Julio Baghy. [...]* »

A.- Ni nun resumu la karieron de la verkisto ĉiam citante Roger Bemard :

Cl.- « *Fondinto kaj animinto de la du solaj Esperantaj kabaretoj, **La Verda Kato** (1920-1926) kaj **La Tri Koboldoj** (1949-1956), vizitataj kaj ŝatataj de la tuta Esperanta mondo, li publikigis du romanojn : **Anni en Montmartre** (1930) - simpla sed trafa rakonto de aventuro en Parizo, kaj la longan, densan, maturan **Kiel akvo de l'rivero** (1963) riĉan je simpatiaj homportretoj, kaj eŭrop-historie streĉan. Li publikigis ankaŭ du kolektojn de siaj kabaretaj verkoj : **La Verdkata Testamento** kaj **La Ĝoja Podio** ; krome kolektojn de siaj noveloj : **La stranga butikoj** kaj **Vole, Novele**, kaj ankaŭ ĵus la kolekton de siaj famaj **El mia Ridpunkto** sub la titolo **Kun siaspeca spico**. Regula kunlaboranto de **Literatura Mondo** kaj de **La nica literatura revuo**, li aperigis dum tri jaroj la neanstataŭigitan spritgazon **La Pirato**. [...] Gramatikisto ne kabineta, li preferis elfosi la latentojn de Esperanto, kaj, kiam necese, eltiri el la verkoj de Zamenhof la abundajn ekzemplojn, kiuj pravigis lian **Ne kiel Meier** kaj lian kontribuon al la **Simpozio pri ata-ita**. Al li cetere la Akademio ŝuldas la instigon al studado kaj ĝustigo de tiu grava demando. »*

A.- Dum la venontaj aŭgustaj semajnoj ni legos al vi erojn el la nova libro de Raymond . Schwartz : *Kun siaspeca spico*, kiun ĵus aperigis Stafeto. Tio tucerte instigos pli ol unu (aŭskultanto akiri tiun verkon, kiu estas minejo da spritaĵoj.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!